# *Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Homaj Rajtoj, la 10-a de decembro 2024*

Kiam la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis proklamita en la jaro 1948, ĝi konsistigis promesplenan mesaĝon al mondo disvundita de terura monda milito. La diversaj ŝtatoj kun siaj diversaj popoloj aliĝis al la principoj prezentitaj en la Universala Deklaracio – kiel faris ankaŭ multaj neregistaraj organizoj. Universala Esperanto-Asocio deklaris tiujn principojn fundamentaj al la laboro de la Asocio.

Hodiaŭ, la principoj de la Universala Deklaracio restas tro ofte malobservataj, tiel ke tutaj popoloj suferas militon, malriĉon, malsanecon kaj senhejmecon, milionoj da rifuĝintoj apenaŭ eltenas sian situacion, kaj konfliktoj kaj militoj multiĝas, kune kun malobservoj de bazaj homaj rajtoj.

Ni urĝe alvokas al registaroj, internaciaj organizoj kaj simplaj homoj tra la tuta mondo, ke ili refortigu kaj renovigu siajn klopodojn por garantii la bazajn homajn rajtojn al ĉiuj homoj kaj popoloj.

En nia asocio, la Deklaracio de Homaj Rajtoj do fundamentas nian agadon. Ni aparte interesiĝas pri internacia komunikado, pri la rajto esprimi sin kaj esti aŭdata en spirito maksimume egaleca kaj inkluziva. Pro tio, ni pristudas kaj antaŭenigas lingvajn homajn rajtojn, kaj la vojon de interkompreniĝo inter malsamaj popoloj.

Ĉiujare nia Asocio observas la Tagon de Homaj Rajtoj, la 10-an de decembro, kune kun alia grava dato: la 15-a de decembro, kiam naskiĝis L. L. Zamenhof (1859-1917), la iniciatinto de Esperanto. Ĉi-jare ni ankaŭ festas la 70-an datrevenon de la Rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, akceptita en Montevideo la 10-an de decembro 1954, kiu rekonis "la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo." Tiu rezolucio lanĉis jam sepdek jarojn da kunlaboro inter Unesko kaj UEA.

Okaze de la Internacia Tago de Homaj Rajtoj 2024, ni renovigas nian promeson antaŭenigi la homajn rajtojn, agadi por minimumigi kaj forigi lingvajn obstaklojn en internaciaj rilatoj, kaj disvolvi komprenon kaj estimon inter la diversaj popoloj de la mondo. Sen interkompreniĝo ne eblas eviti militojn, ne eblas solvi la problemojn de la hodiaŭa mondo, kaj ne eblas krei la kondiĉojn por daŭripova mondo en estonteco.